

Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe,
 Feliĉa veturo Feliĉa veturo Glückliche Fahrt

tradukita de Manfredo Ratislavo *tradukita de Wilhelm Barnickel*

Rompiĝas nebuloj
 Sub hela ĉielo,
 La timan ligilon
 Malligas Eol'.
 Susuras la ventoj,
 Ekagas ŝipistoj.
 Rapide! Rapide!
 Disiĝas la ondoj
 Kaj alproksimiĝas
 La ŝip' al la land'!

Nebul' disŝiriĝas,
 Ĉielo heliĝas.
 La timan ligilon
 Malnodas Eol'.
 Susuras la ventoj,
 Ekagas ŝipistoj.
 Rapidu! Rapidu!
 La ondoj partiĝas,
 La for' proksimiĝas.
 Vidiĝas la land'.²

Die Nebel zerreißen,
 Der Himmel ist helle,
 Und Äolus löset
 Das ängstliche Band.
 Es säuseln die Winde,
 Es rührt sich der Schiffer.
 Geschwinde! Geschwinde!
 Es teilt sich die Welle,
 Es naht sich die Ferne;
 Schon seh ich das Land!

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

*Traduko de la Germana poemo "Glückliche Fahrt" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (*1921-09-02) en 1983.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)

Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)

MR.-102-2 / Arg-268-541 (2004-09-09 09:12:59)

Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pliiĝustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "landon". Kaj la akuzativa finaĵo "-on" ne estas elizebla (ellasebla).

²Sinjoro Barnickel origine skribis:
 Jam vidas mi land'.
 (Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)